

Tribuno



Leginte la duan parton de la artikolo de Pavla Dvořáková pri la Esperanto-Muzeo en Svitavy, pripensu, ĉu kaj kiel vi povas spekti kaj uzi ĝiajn kolektojn kaj helpi ĝin. Ĉu per vizito? donaco? diskonigo? aŭ almenaŭ per retvizito?..

Dek jaroj de la Esperanto-muzeo en Svitavy

2a parto. Eta bilanco kaj resumo de la revoj kaj realeco

En la novembra numero de *La Ondo de Esperanto* mi priskribis la estiĝon de la Esperanto-muzeo en Svitavy, la bazajn principojn de ĝia funkciado kaj ĝiajn specifajn trajtojn, per kiuj ĝi diferenciĝas de la ceteraj Esperanto-muzeoj. Tiam mi promesis daŭrigi “en unu el la sekvontaj numeroj”, sed mi ne supozis, ke pro pluraj kialoj tio daŭros duonan jaron. Mi pardonpetas pro la prokrasto.

Ne estas facile kapti la esencon de la dekjara laborado en unu artikolo, ĉar ne devas temi pri longa teda oficista agadraporto aŭ pri supraĵa odo je niaj brilaj sukcesoj. Tamen la dekjara jubileo meritas ioman resumon kaj internacian diskonigon de la projekto. Krom sukcesoj mi volus mencii ankaŭ de ekstere nevideblajn problemojn kaj komplikaĵojn, kiujn ni devis kaj devas solvadi, ĉar vere ne temas pri promeno tra la rozĝadeno. Temas pri mia persona starpunkto laŭ mia propra laborsperto kaj kompreneble mi ne pretendas ian kompletecon.

La nomo “Esperanto-Muzeo”, des pli en tiom ĉarma konstruaĵo, sendube sonas bele kaj digne kaj por ni temis pri loga defio. Tamen unu el la principaj demandoj por ni estis kaj daŭre estas: kiugrade – malgraŭ pluraj evidentaj avantaĝoj por nia movado – la plejparte statika muzea formo taŭgas por efika publika prezento de Esperanto? Tio, kio ĉefas, la viva komunikado kaj rilatoj, nur malfacile pereblas.

Por mi mem tio estis daŭra fonto de streso. Belaj kolektmaterialoj aŭ eldonaĵoj ne tiom abundas, aŭ la originaloj ne plu haveblas aŭ tro multekostas, necesas plejparte pene serĉi kaj krei faksimilojn el interreto, kaj la pretigon daŭre komplikas la ekstremecaj kopirajtaj reguloj. Mankas rimedoj kaj parte ankaŭ teknika kompetenteco por utiligo de atentokaptaj interagaj teknologioj – nia originala multimedia tuŝpanelo intertempe jam maljuniĝis kaj nun ne plene funkcikapblas. La devo skribi dulingve (ankaŭ por la publiko) malgrandigas la spacon por la bildoj kaj unuavide mallogas iujn de legado. Pro la loĝdistanco de Svitavy malfacilis optimume plani fizikan instaladon k. t. p.

Malgraŭ ĉio ĉi, krom la enkonduka ekspozicio, estis kune kun la konstante aktualigata ĝenerala prezento realigitaj entute dek plejparte unujaraj temaj ekspozicioj. Kvin el ili rilatis al diversaj aspektoj de la historio, la ceteraj al fervojo, infanoj kaj junularo, humuro, spiritaj tradicioj kaj la plej buntaj supozeble estis tiuj rilataj al arto, kolektado kaj vojaĝado. Kiom ni malgraŭ la skizitaj komplikaĵoj sukcesis, vi povas mem prijuĝi en la fotogalerioj de la muzeaj retejoj kaj ĉe Ipernity (vidu la ligilojn fine

de la artikolo). La inaŭguroj estis ĉiam akompanataj de unu- aŭ dutaga kleriga kaj kultura programo, en kiu partoprenis ankaŭ eksterlandaj prelegantoj.

Por ke la muzeo fariĝu ankaŭ vivanta komunuma spaco, okazadis en la muzeaejo klubaj kunvenoj kaj kursoj, regionaj renkontiĝoj, Infanaj Tagoj. Krome estis organizataj ĉeflingvaj aranĝoj por la loka publiko (tio estis kondiĉo de la lukontrakto); el tiuj, prizorgataj de lokaj esperantistoj, la plej sukcesa estas ĉiujara porinfana artateliere “Marcipana Kristnasko”.

Krom tio, por montri la internaciecon de la Esperanto-movado kaj por diskonigo de la urbo eksterlande, ĉiujare okazis tutlanda aŭ internacia Esperanto-aranĝo – EKOTUR (2009), Konferenco de ĈEA (2009), Vikimano (2011), OSIEK-Konferenco pri sciencfikcio kaj robotoj kaj Internaciaj Lingvokursoj de Stano Marček (2012), Muzea kaj kluba solenaĵo (2013), KELI-Kongreso (2015), Antaŭkongresa Ekskurso antaŭ la 101a UK en Nitra (2016) kaj Jubilea Solenaĵo kun Internacia Muzea Seminario (2018). Inter ili Vikimano alportis al ni la plej grandan reeĥon en la ĉefaj amaskomunikiloj (ankaŭ pro tio, ke danke al esperantistoj estis fondita la ĉefha Vikipedio). La tutsemajna OSIEK-Konferenco estis la plej riĉa koncerne la kulturalan programon kaj partoprenon de Esperanto-eminenculoj (István Nemere, Liven Dek, Gerrit Bervelling k. a.); la videospecimenojn el la programo eblas plu spekti en nia muzea retejo.

La antaŭkongresa restado en 2016 ne estis multnombra, sed ĝi allogis partoprenantojn ekde Brazilo ĝis Japanio, kio altigis nian prestiĝon ĉe la urbaj instancoj. Kadre de la kulturaj programoj ni bonvenigis, ekzemple, ankaŭ Georgon Handzlik, la kantgrupon *Senprobleme*.

Danke al la kunlaboro inter ĈEA kaj la loka studenta teatroensemblo *Doma* okazis en Svitavy la mondpremieroj de la Esperanto-surscenigoj de la du verkoj de Ĉapek: *R.U.R.* (2012) kaj *El vivo de la insektoj* (2016), kiujn poste povis spekti partoprenantoj de UKoj kaj aliaj aranĝoj.

Dum la dek jaroj klare montriĝis, ke plej multaj esperantistoj preferas veni ne individue por viziti la muzeon mem aŭ por studi en ĝi, sed okaze de iu renkontiĝo por ĝui la programon kaj renkonti aliajn homojn kaj babili kun ili; la ekspozicioj por multaj el ili estas afero neunuaranga. Do, kvankam la muzeo estis principe memstare alirebla tutjare (la ĉiĉeronado okazas nur laŭ la anticipa interkonsento), la vizitoj ne estis tiom oftaj, kiom ni eble dezirus. (Estus interese kompari la staton kun aliaj Esperanto-muzeoj, ĉar oni konas nur la statistikon de la ŝtata Esperanto-muzeo en Vieno, kiu ja agas en grandurbo sur alia nivelo.) Temas pri nenies kulpo, sed pri la respiegulo de la (mal)grandeco de nia movado kaj de la nuntempa vivstilo kaj vojaĝpreferoj.

Malgraŭ tio ni plezure bonvenigis individuajn gastojn el kelkaj dekoj da landoj. Ĝojige estas, ke pluraj eksterlandanoj revenadis. Okazis krome pluraj grupaj vizitoj, ekzemple el Slovakio, Pollando, Italio, Francio kaj Ĉinio. Pri la vizitantoj gastame

okupiĝadis membroj de la loka Klubo de amikoj de Esperanto. Ĉiukaze la dek jaroj montris ankaŭ al la urbo mem, ke kvankam vojaĝemaj esperantistoj ne tiom abundas, kiom ni ĉiuj sopiris, la kunlaboro havas avantaĝojn, pro kiuj la kontrakto plu daŭras. Gravas, ke la ĉefaj personoj de la urbo kaj la estrino de la urba muzeo, simpatias kun la ideo de Esperanto kaj subtenas nin. Sen tio eble eĉ pli pompaj rezultoj de nia laboro ne helpus nin daŭrigi.

Akiri veran intereson de la publiko estis problemo, ĉar malgraŭ parta atento de la amaskomunikiloj, Esperanto daŭre estas subkonscie perceptata kiel io stranga kaj senperspektiva. Svitavy estas interesa urbo kun vidindaĵoj kaj kun bona atingeblo pli malpli centre de Ĉeĥio, tamen por kutimaj turistoj ĝi ne multe konatas kaj vizitatas. Tamen la lokanoj havis la okazon viziti nin, ekzemple, dum la ĉiujaraj Muzeaj Noktoj kaj oni sukcesis havi ripete grupajn vizitojn, precipe el la kunlaboranta urba bazlernejo, en kiu agas esperantistoj. Nun la specialan programon en nia muzeo ofertas al la lernejaj grupoj la urbaj muzeo kaj galerio, kaj tio deprenas de ni ioman ŝarĝon. Pliajn iniciatojn indus provi, sed en la amatora medio ni frontas la mankon de homfortoj.

Parto de la ekspozicio "Kun Esperanto ĉirkaŭ la mondo" (2015)



Por ĈEA aparte gravas, ke en aparta granda deponejo ĝi povas senpage konservi siajn bibliotekojn kaj arkivon. Tio estas la ĉefa avantaĝo de la kontrakto. Marie Ĉumová el Svitavy ĝis nun volontule katalogigis preskaŭ 19 000 bibliotekajn unuojn: librojn kaj jarkolektojn de gazetoj. La biblioteko havas sian apartan paĝon ĉe la muzea retejo kun elŝutebla katalogo kaj listo de ekstraj ekzempleroj por interŝanĝo. En la biblioteka sfero realiĝis kunlaboro, ekzemple, kun la biblioteko de GEA en Aalen, IKC Herzberg kaj Nacia Esperanto-Muzeo en Gray. En 2019 estis ligitaj kontaktoj kun Danlando, nia muzeo sendis donacojn al la nova muzeo en Ĉinio kaj al Bjalistoko.

Pro financaj kialoj la libroj kaj gazetoj estas akiritaj plejparte donace de individuoj kaj institucioj (inkluzive de la Viena muzeo, E@I, fondaĵoj Thorsen kaj Bachrich kaj dekoj da aliaj, kiujn ni dankas). Pro juraj, financaj kaj organizaj komplikaĵoj ĝis nun ne estas bedaŭrinde finsolvita oficiala pruntordo laŭ la ministeria modelo, por ke ni estu parto de la biblioteka reto kaj povu peti subvenciojn.

La libroj kaj alia materialo laŭ antaŭa interkonsento studeblas kaj malgrandkvante kopieblas surloke kaj por aktivaj membroj kaze de grava bezono prunteblas. La problemo estas, ke eĉ la spacohava deponejo komencas ne plu sufiĉi al niaj kolektoj. Krom tekstaj dokumentoj en la muzea posedaĵo estas ankaŭ bildkartoj, filatelaj aĵoj, insignoj k. a., kiujn en niaj volontulaj kondiĉoj ni ne sukcesas detale prilabori.

Parton de la ekspoziciaĵoj ni nur prunteprenadas, grandparte de membroj de ĈEA.

ĈEA povas fieri pro la amplekso kaj kvalito de la cifereciga laboro, kiun antaŭ pli ol 20 jaroj komencis Miroslav Malovec. Danke al diligenteco de li kaj de lia laborgrupo estas enkomputiligitaj miloj da tekstoj, ekde 2018 sekure konservataj ankaŭ en la granda datumdepono de ĈEA. Nun estas ordigataj kaj elektataj por alŝuto ankaŭ foto-, son- kaj videodosieroj kaj starigataj kriterioj por alirebligo. Temas pri postulhava kaj daŭra agado, kiu superas niajn homfortojn. Origine oni planis publike prezenti ankaŭ tiun ĉi agadon kiel integran parton de la muzea projekto (mi detale skribis pri tio en la prelegaro de KAEST 2016). Lige kun la ŝanĝo de strategioj por la dua jardeko de la muzeo, verŝajne denove evoluos la du agadsferoj kadre de ĈEA paralele, sed pli memstare.

Kion plian donis la muzeo al la Esperanto-movado? Krom la reprezenta poŝta adreso de ĈEA, danke al la ekzisto kaj aktivado de la muzeo kreskis la atento de la ĉeĥaj amaskomunikiloj pri Esperanto. Laŭ mia statistiko pri la aktivado de la Esperanto-muzeo temis en sep radioelsendoj, kvar raportoj en la tutŝtata televido kaj 11 en la regiona televido; krome pri nia muzeo aperis kelkdek artikoloj en la regiona gazetararo kaj senpagaj anoncoj en kulturaj kaj turismaj retejoj.

La muzea projekto senduble vigligis la ĝeneralan agadon de ĈEA, engaĝiĝon de multaj membroj kaj internaciajn kontaktojn. Danke al la ekspozicioj kaj programoj estis prezentitaj valoraj informoj pri la historio kaj nuntempo de la movado. Ili estos

prilaborataj ankaŭ por la reta uzado, ĉar temas parte pri unika materialo, ekzemple, pri la historio de la Esperanto-kolektado, pri famaj Esperanto-vojaĝantoj, aŭ pri profesiaj artistoj-esperantistoj.

La tuta laboro estis realigita senpage. La necesaj elspezoj por la ekspozicioj kaj renkontiĝoj, ankaŭ por aĉeto de teknikaĵoj estis financitaj el la negranda buĝeto de ĈEA, el donacoj, kelkfoje el negrandaj porokazaj subvencioj de la regiono. La urbo Svitavy plurfoje disponigis senpage siajn salonegojn por niaj kulturaj programoj. Monpremietoj estis maloftaj kaj pli malpli simbolaj kompare kun la farita laboro. Dankon al ĉiuj volontule engaĝiĝintaj kolegoj! Mi volus mencii precipe Libuše Dvořáková pro la loka organizado en Svitavy, Marie Čumová pro la biblioteko, Petr Chrdle pro la internacia diskonigo kaj kunlaboro kaj kontribuo al la aranĝoj kaj Miroslav Malovec pro la ciferecigado, tradukoj kaj kunpretigo de kelkaj ekspozicioj.

Kiel esperantistoj loĝantaj malproksime aŭ nepovantaj veni al ni povas utiligi kelkajn rezultojn de nia laboro? Krom la oficiala muzea retejo oni povas viziti nian retpaĝon ĉe Ipernity. Ekde ĝia lanĉo en januaro 2011 ĝis la dekjariĝo de la muzeo en septembro 2018 ĝi iom post iom disponigis ĉ. 2300 dosierojn en 57 albumoj kaj la nombro plu kreskas. En aprilo 2019 ĝi havas preskaŭ 155 mil virtualajn vizitojn el pli ol 90 landoj.

La muzeo kiel paganta membro havas nelimigitan alŝutokapaciton kaj la dosierojn povas (krom tekstoj) spekti iu ajn. Senpage registriĝintaj membroj povas ankaŭ elŝuti ilin. Nun la strategio iom ŝanĝiĝas lige kun neceso de teknika modernigo. Oni povas aliĝi al la grupo “Amikoj de Muzeo de Esperanto en Svitavy” ĉe Facebook kun ĉ. 350 membroj el pli ol 30 landoj aŭ aboni senpage ĈEA-Retkomunikojn, aperantajn kelkfoje jare.

La komuna laboro farita per malmultaj rimedoj kaj homfortoj sendube rimarkindas kaj aprezindas, ĝi alportis novan kvaliton kaj perspektivojn al la agado de ĈEA. Tamen granda kvanto da laboro kuŝis daŭre sur la ŝultroj de kelkaj personoj, kaj pro la elĉerpiĝo de fortoj montriĝas, ke la origina plano pri larĝa moderna koncepto de la muzeo de la 21a jarcento kaj ĝia proksimigo al profesiaj normoj eble superas niajn nunajn fortojn, kaj ni devos parte adaptiĝi al la realeco. Ankaŭ nia disigiteco en la tuta lando kaj nesufiĉaj fakaj kapabloj malhelpas efikan komunikadon kaj praktikan kunlaboron.

Pro la troŝarĝiĝo mi de 2019 retiriĝis de pretigo de fizikaj ekspozicioj, kunorganizado kaj dokumentado de la aranĝoj en la muzeo kaj diskonigo de la projekto kaj de la urbo. Mi plu okupiĝas pri la redaktado, esplorado pri la historio de la movado kaj sistemigado kaj alirebligado de la ciferecigitaj dokumentoj. Miaj posteuloj agos en mia laboro eble iom alimaniere, kaj supozeble iom ŝanĝiĝos la ĝenerala koncepto. Ĉiukaze ankaŭ en sia dua jardeko la muzeo plu vivas kaj funkcias, kaj ĝi evoluos laŭ niaj nunaj eblecoj kaj daŭre havos nemalmulton por oferti.

Ni kore invitas la legantojn de *La Ondo de Esperanto* viziti persone nian muzeon ĉu okaze de aranĝoj aŭ iam ajn dum la jaro okaze de vizito de Ĉeĥio, eventuale ankaŭ por prelegi aŭ pretigi alian programon. Ĉiuj bonvenas viziti niajn retejojn kaj utiligi niajn materialojn. Serĉataj estas novaj partneroj por la kunlaboro, precipe koncerne libro- kaj gazetinterŝanĝon, historiajn esplorojn kaj ciferecigadon. Nova ekspozicio kun akompana programo, al kiu jam ni invitas vin, estos inaŭgurita la 14an de septembro 2019.

Pavla Dvořáková

Kontakto kaj retligiloj

Retadreso: muzeo@esperanto.cz

Muzea retejo (kun biblioteka subpaĝo) <http://www.muzeum.esperanto.cz/eo/cxefa>

Paĝo ĉe Ipernity <http://www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy>

Grupo ĉe Facebook <https://www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/>

Artikolo “Dokumentado pri la 10-jariĝo de la Esperanto-Muzeo en Svitavy” <http://www.muzeum.esperanto.cz/eo/expozicioj/dokumentado-pri-la-10-jari-o-de-la-esperanto-muzeo-en-svitavy.html>

ipernity™ Serĉi iun aŭ ion ... + Alŝuti | Organizi | Esplori Esperanto-Muzeo ...

Bonvenon ĉe Esperanto-Muzeo en Svitavy

Vii | Aktualajoj | Fotoj | Albumoj | Artikoloj | Dokumentoj | Grupoj | Kontaktoj | + Inviti

10 jariĝo de Esperanto-Muzeo en Svitavy

albumo kreita en la 2a de Oktobro 2018

Laŭplaĉe adaptu vian ĉefpaĝon Rigardu tiun ĉi paĝon kiel vidus ĝin anonima vizitanto

Pri Esperanto-Muzeo en Svitavy

Membro de club ekde 2011 • 154 428 vizitoj
Pliaj informoj